

BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO,

redaktata de Léon Champy, Fr. Schoofs, Van der Biest-Andelhof,
Jer. Van Laere kaj Oscar Van Schoor.

ABONPREZO :

Belglando . . . Fr. 4.— (Sm. 1.60)
Eksterlando . . Fr. 5.— (Sm. 2.—)
Unu numero . . Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Sekretariejo : 49, Kleine Beerstraat,
(rue de la Petite Ourse), Antwerpen-
Anvers.
Abonoj kaj Monsendoj : 20, Vondel-
straat (rue Vondel), id.
Jurnaloj, broŝuroj, libroj : 26, Arend-
straat (rue de l'Aigle), id.

*Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por
si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.*

FLORAJ LUDOJ

La literaturaj festoj, konataj sub la nomo «Floraj Ludoj», rememoras tiujn de la flandraj retorikistoj kaj la «Landjuvelojn» el la pasintaj jarcentoj.

La «Floraj Ludoj», kiujn oni jam retrovas dum la unua kvarono de la XIV^a jarcento, okazis komence en Tuluzo (Toulouse), kie aro da eminentaj burĝoj penadis por revivigi la poeziarton de la «Trubaduroj». En la jaro 1323 «Sep trobadores de Tolosa» invitis, per versfarita letero, ĉiujn amikojn de la gaja scienco (gay saber), por partopreni en la literatura konkurso, okazonta en Tuluzo, la 1^{an} de Majo 1324. La venkanta estus proklamata kiel Doktoro de la Gaja Scienco, kaj akirus premie oran violon. Du jarojn poste, la societo organiziĝis kiel «consistori de la gaya saber»; en 1355 ĝi aljuĝis kiel premion oran kalendolon, por la plej bela paŝtista kanto (pastourelle) kaj oran sovaĝan rozon por la plej bela danckanto. Kiel kuraĝigajo ĝi plie aljuĝis tri argentajn diantojn. La venkinto akiris la titolon «maestre de la gaya saber».

Je l'fino de la XV^a jarcento, sekve de la sieĝo de Tuluzo, la palaco kaj la ĝardeno de la «gaya saber» estis distruitaj kaj la «consistori» estis proksima je sia pereco. Ĝi tamen renaskiĝis, dank' al la malavareco de riĉa eminenta Tuluza burĝino, Clémence Isaure, kiu donacis ĝin per grandvaloroj premiaj floroj kaj garantiis al ĝi testamente riĉajn ĉiujaraĵn rentojn. La festoj de nun alprenis la nomon «Jeux Floraux».

Dum la jaro 1695, la franca reĝo Ludoviko XIV difinis ĝiajn enspezojn je 1400 livres, 1000 por la premiaj floroj kaj 400 por la organizado de festoj. Je tiu jaro la unua premio konsistis en ora amaranto por la plej bela odo; la aliaj premioj estis arĝenta violo, rozo kaj kalendolo. En 1745 estis decidata ke, tiu, kiu estis akirinta tri sekvantajn fojojn la oran rozon, akirus la titolon «*maître ès jeux floraux*».

Nuntempa fazo de la «*Floraj Ludoj*» estas la ĉiujaraj festoj organizitaj en la sudfrancaj urboj de la «*Felibroj*» aŭ provençalaj literaturistoj. Tie la venkantoj ankaŭ ricevas florojn; oni tamen aljuĝas aliajn premiojn.

La devenon de la «*Floraj Ludoj*» en Aragonujo kaj Katalonujo oni same retrovas dum la XIV^a jarcento. En Barcelono tiuj festoj okazas ankoraŭ ĉiujare.

Estis do feliĉa ideo kunigi dum la nuna jaro la literaturan konkurson, kiun la «*Revuo*» organizas ĉiujare inter siaj legantoj, kun la «*Floraj Ludoj*» ekzistantaj en la poeziema kongresurbo. La organiza komitato de la Kongreso interkonsentis kun niaj amikoj el Barcelono kaj Vilasar'o, por miksi la du kutimojn, la novan kaj la malnovan, kaj krei la «*Internaciajn Florajn Ludojn*».

AMATUS.

SGIIGOJ PRI LA "FLORAJ LUDOJ"

ORGANIZA KOMITATO

La organiza komitato estas definitive starigita jene:

Honora prezidanto: D^{no} LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF;

Prezidantoj: S^{ro} GERONI VILA ROCA kaj CARLO BOURLET;

Sekretario: S^{ro} F. PUJOL;

Komitatoj: F^{ino} MARIA MAS, D^{no} RENÉ ARTIGUES, BARONO FÉLICIEN DE MÉNIL.

KONDIĈOJ

Ĉiuj manuskriptoj konkursantaj por la premioj, devas esti senditaj **antaŭ la 1^a de Junio 1909**, lasta templimo, al la redakcio de **La Revuo**, 79, Boulevard St-Germain, Parizo.

La manuskriptoj devas esti **anonimaj**.

Ĉiu manuskripto devas surhavi nur *devizon* kaj esti akompanata de fermita koverto, eksterhavanta la kopion de la devizo kaj internhavanta la nomon kaj adreson de la aŭtoro.

Ĉiuj temoj devas esti traktitaj en originala formo. *Nenia traduko estas akceptata*.

TEMOJ KAJ PREMIOJ

1^o **Ordinaraĵ temoj**, kiuj ĉiujare restos la samaj:

ESPERANTISTA SOCIETO EN VILASSAR-DE-MAR. — Poezio pri Amo. — *Bukedo el naturaj floroj*. (1)

(1) La gajninto de tiu ĉi premio ĝin donacos al de li elektita Sinjorino, kiu ricevos la titolon de *Regino de la Festo*, kaj kiu disdonos la aliajn premiojn al la gajnintoj.

LA REVUO. — Poezio pri homaro. — *Arĝent-orita floro*.

KONGRESA KOMITATO. — Poezio pri Fido. — *Arĝenta violo*.

2^o *Temoj proponitaj de kongreslandanoj*.

LIA MOŝTO S^{ro} JOHANO DE LA CIERVA, hispana ministro de Enlandaj Aĵoj. — Raporto pri memorinda paĝo de l' historio. — *Kolekto da esperantaj verkoj*.

LIA MOŝTO LA BARONO DE BONNET, Rektoro de la Barcelona Universitato. — Ĉu estas necesa la lernado kaj propagando de internacia lingvo? — *100 Frankoj* (Sm. 40).

LA BIBLIOTEKO «*JOVENTUT*». — Noveleto pri naciaj kutimoj. — *100 Pezetoj*.

LIA DEPUTATA MOŝTO S^{ro} T. RIUS Y TORRES. — Aro da popolaj rakontoj. — *50 Pezetoj*.

ESPERO KATALUNA. — Al la plej bone verkita aro da dekdu rakontetoj, longaj je duona ĝis tuta ordinare presita paĝo, gradigitaj por praktika legado de esperantaj kursoj. — *50 Frankoj*.

CENTRE AUTONOMISTA DE DEPENDENTS DEL COMERÇ I DE LA INDUSTRIA. — Tezo pri la societa devizo «*Edukado, Mutualismo, Naciismo*». — *50 Pezetoj*.

VILA ESPERANTISTARO. — Originala fableto. — *50 Pezetoj*.

S^{ro} JOHANO ROSALS, ĝenerala esperanta konsulo en Barcelono. — Tri broŝuretoj por propagandi Esperanton: unua por la laboristaro, dua por la mezklasa popolo, tria por la kleruloj. — *25 Frankoj*.

ESPERANTA SEMO, *Esperantista Societo de Sabadell'o*. — Prozaĵo, kiu elprouas la emon de esperanta lingvo konservi kaj plifirmigi la naturajn lingvojn. — *Eslibro de la societo bronzo farita*.

BONANOVA STELO, *Esperantista grupo el Bonanova*. — La maro. — *Arta objekto*.

PACO KAJ AMO, *Esperanta grupo el Gracio*. — Esperanto kiel simbolo de Paco kaj Amo. — «*La Faraono*» lukse bindita.

TUTMONDA ESPERO. — Rakonto por la infanoj. — *Ĉiama abono al tiu ĉi revuo*.

LA SUNO HISPANA. — Versaro pri la patrina amo. — *Arta objekto*.

S^{ro} RAMON TOBELLA, de la esperanta presejo «*Tobella & Costa*» — Esperanto, bona ilo internacia por propagandi la literaturajn ĉefverkojn. — *Arta objekto*.

LA SOCIETAT D'ATRACCIÓ DE FORASTERS. — Barcelono, taŭga vintra restejo. — *Arta objekto*.

«*NU !!*», *Kataluna Grupo en Parizo*. — Bonhumora rakonto. — *Aro da katalunaj objektoj*.

SOCIETO ESPERANTISTA DE IGUALADA. — Gloro al Kolumbo! eltrovinto de la nova mondo. — *Arta objekto*.

LA VILASARA URBESTRARO. — Temo lasita al elekto de la konkursanto, prozaĵo. — *Arta pokalo*.

HISPANA SOCIETO POR LA PROPAGANDO DE ESPERANTO. — Originala monologo prezentebla. — *25 Frankoj*.

LIA MOŝTO D^{no} JOHANO B. BENILOCH, Episkopo de URGELL. — Religia temo. — *Arta objekto*.

LA GRUPO ESPERANTISTA «*BARCELONO*». — Resuma historio de disvastigado de Esperanto. — *Arta objekto*.

S^{ro} ALFONSO SABADELL, prezidanto de la Grupo Esperantista «*Barcelono*». — Taŭgeco de la esperantistaj kongresoj por la disvastigado de la interna ideo de Esperanto. — *Arĝenta poŝmonujo*.

3^o *Temoj proponitaj de alilandanoj*.

LA REVUO. — Respondo al «*La Malhelpisto de l' Hezito*», — *200 frankoj* (Sm. 80) (Vidu paĝon 231 de tiu ĵurnalo.)

D^o L. L. ZAMENHOF. — Regno de homoj. — *Plena kolekto de la verkoj de l' Majstro, riĉe binditaj kaj kun manuskripta dediĉo*.

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO. — Fideleco. — *Belga portreto de L^o Zamenhof, valoro Fr. 37,75 (15 Sm.)*

LINGVO INTERNACIA. — Ni fosu nian sulkon ! — *Libroj el la kolekto de L. I. (aŭ de la Presa Esp. Societo), laŭ elekto de la premiita kandidato, valoro Fr. 25 (10 Sm.)*

JUNA ESPERANTISTO. — Juneco. *Libroj el la katalogo de la Presa Esp. Societo, laŭ elekto de la premiita kandidato, valoro Fr. 12,50 (5 Sm.)*

BELGA ESPERANTISTO. — Loka-regiona legendo (laŭ libera temo), prozaĵo da 4-5 paĝoj — *Branĉo de rozujo el fero forĝita, longa je 15 cm. Belga artaĵo, specialaĵo de la urbo Antverpeno.*

GERMANA ESPERANTISTO. — Internacia frateco per Esperanto. — *Plena kolekto de la verkoj de la firmo Möller und Borel, riĉe bilditaj.*

POLA ESPERANTISTO. — La plej bona monologo, preferinde el la vivo esperantista. — 1^o *Bele bilditaj ĵarkolekto de « Pola Esperantisto » por la jaro 1908 kaj ĉiuj literaturaj eldonoj de « P. E. » kiuj aperos antaŭ la Barcelona Kongreso.* — 2^o *Ĵarkolekto de « P. E. » por la jaro 1908 kaj ĉiuj literaturaj eldonoj de « P. E. », en simplaj kovriloj.* — 3^o *Ĵarkolekto de « P. E. », por la jaro 1908, bele bildita.*

FRANCA ESPERANTISTO. — La plej bona originala rakonto, ne pli longa ol du paĝoj aŭ kvar kolonoj kiel la felietono de Franca Esperantisto. — *25 frankoj (Sm. 10.)*

THE BRITISH ESPERANTIST. — La historio de Esperanto, verkota en de 3000 ĝis 10000 vortoj. — *40 Sm.*

TRA LA FILATELIO. — Poezio pri Filatelio. — *20 frankoj da poŝtmarko laŭ katalogo.*

La « REVUO » sin okupas pri kolektado de aliaj tiaj premioj, kiujn « Belga Esperantisto » eventuele publikigos en proksima numero.

La Blinduloj en Belgujo

(Ĉerpita el la *Pariza Revuo*: le *Valentin Haüy*, juillet 1907)

— 0 —

I. LEĜARO

La *Prikomunuma leĝo* de 1^o30^o de Marto 1836^a devigis la *Komunumkasojn* pagi la prizorgad-kaj instrukcostojn de la blindaj infanoj : nur pro monmanko la Stato kaj la Provinco helpis per monaldono.

Tiun leĝon, bonegan por la epoko, ni ŝuldis al blinda belga parlamentano, Aleksandro Rodenbach, unu el la unuaj kaj plejbrilaj lernintoj de Valentin Haüy.

La *Leĝo pri helpadloko* de la 14^a de Marto 1876^a kreis, en ĉiu provinco, *interkomunuman kason*, destinitan por pagi la 3/4 el la prizorgadkostoj; la ceteran 1/4 devas pagi la Komunumo, kiu por tio recevis monaldonon de la Ŝtato kaj de la Provinco. Tiu leĝo alportis gravan helpon al la disvastigo de la blinduledukado; tamen ĝi havis ankoraŭ difektojn. Malpli ol la unua, ĝi postulis de la Komunumoj monoferojn, kaj iuj

komunumoj malriĉaj tre malfacile konsentis sendi al la institutoj siajn blindulojn. Aliflanke kelkaj komunumoj sin kredis rajtigataj de la leĝo mem elekti la instituton, ofte kontraŭ la volo de la gepatroj.

Por forigi tiujn difektojn, la Ministro Jules Lejeune ellaboris kaj igis la Parlamenton aprobi la leĝon de 1^o 27^a de Novembro 1891, pri la Publika Bonfarado. Tiu leĝo, pri kiu la ĉiulandaj blindulamikoj envias nin, tute senŝarĝigas la Komunumon pri la superdiritaj kostoj, kaj pri ili ŝarĝas la Interkomunuman Kason po unu duono, la Provincon po unu okono, kaj la Ŝtaton po tri okonoj. La Komunumo oficiale permesas sendi la blindajn infanojn en specialan instituton, kiu ĝi elektas, interkonsente kun la gepatroj. Se okazas malkonsento pri tiu elekto, la interesavantaj partioj povas sin turni al la Reĝo.

En nia lando la instruado estas libera, ne deviga; sed la leĝistaro, defendinte la edukadon de 1^o blinduloj kontraŭ monmanko de la Komunumo, kaj kontraŭ ĉikanoj ofte maljustaj de malhobla politiko, forigis la malhelpojn, kiujn renkontis la blindulinstruado. Jen estas la rezultato :

La statistiko pri la institutogantaro montras ke en 1890 *133 geblinduloj* ricevis instruon : en 1906 *pli ol 500*. En Francujo kaj Germanujo, du landoj, kie la instruado estas deviga kaj kies popolenhavo estas ses kaj okobla kompare je la belga, havas nur en siaj institutoj respektive 900 kaj 1300 lernantojn.

Tiu komparo evidente montras, ke la libera agado, kuragigata de la Landestraro, estas pli profitdona, pli potenca ol la oftĉikana devigo. La unuan oni fervore akceptas kiel bonfaron : kontraŭ la dua oni emas sin defendi, kaj ofte oni sukcesas sin liberigi de ĝi per pretekstoj nur verŝajnaj.

II. INSTITUTOJ — SOCIETOJ

Belgujo havas ok institutojn por blindaj infanoj :

1 ^o La Reĝa Blindulinstituto de Woluwe-Bruselo	150 lernantoj.
2 ^o La Reĝa Blindulinstituto de Bruselo	100 lernantinoj.
3 ^o La Blindulinstituto de Berchem (Brabanto)	20 lernantoj.
4 ^o La Geblindulinstituto de Bruĝo	80 gelernantoj.
5 ^o La Blindulinstituto de Maaseik	10 lernantoj.
6 ^o La Blindulinstituto de Maaseik	12 lernantinoj.
7 ^o La Geblindulinstituto de Lieĝo	40 gelernantoj.
8 ^o La Geblindulinstituto de Ghlin	120 gelernantoj.

kaj la teknika lernejo por plenkreskaj blinduloj en Antverpeno. 25 lern.

Ekzistas por blindaj maljunuloj rifuĝejoj en Bruselo, Gento kaj Monso.

Ne ekzistas aziloj por blinduloj nekapablaj, nek lernejoj por nenormalaj infanoj, sed oni faris por ĉi tiuj specialan sekcion en la hospitaloj de Neufville (Henegaŭo) kaj de Lovendegem apud Gento.

Ne ankaŭ ekzistas vartejoj por trojunaj blinduloj : sed kompanse, ĉiu instituto aranĝis en si mem vartosekcion, en kiu ili akceptas infanojn kvin-ĉe kvarjarajn.

Multaj societoj stariĝis por plibonigi la sorton de la Blinduloj ; ili estas trispecaj :

I. Blindulsocietoj :

1^o La Federacio de l'Belgaj Blinduloj, interhelpsocieto, kiu fondis en 1886^a kvardeko da lernintoj de la Woluwa Blindulinstituto, kaj kiu akceptas kiel membrojn ĉiujn blindulojn kapablajn pri pangajno.

2^o, 3^o, 4^o. Tri lokaj societoj en Bruselo, Antverpeno kaj Charleroi.

II. Patronadsocietoj :

1^o La Patronadsocieto por la lernintoj de la Reĝa Woluwa Blindulejo,

2^o Tiu por la lernintoj de la Ghlina Blindulejo,

3^o La Protekta Societo por la Antverpenaj Blinduloj.

III. Prizorgadsocietoj por maljunaj blinduloj.

De tiuj ĉi dependas la Aziloj de Bruselo (Reĝa Filantropia Societo) de Gento (Hospice Van Caeneghem), kaj de Monso (Hospice Terrace).

En sekvontaj artikoloj mi plidetale pritraktos la belgan blindulagadon : mi montros, ke la blinduloj, per la speciala instruado, ne nur lernas legi kaj skribi, sed fariĝas sub inteligenta, arta kaj labora vidpunkto, similaj al siaj neblindaj fratoj ; ke vere ili fariĝas membroj utilaj de la homa familio ; ke ili de la homaro ne plu petas neutilan kompton, ne almozojn, sed ke ili deziras mem gajni sian panon per laboro ĉu mana, ĉu spirita, ĉu arta ; ke ĉiu povas kunhelpi la plenumon de tiu nobla deziro, sin penetrante je la devizo de la Woluwa Patronadsocieto : « Al la Blinduloj donu laboron, ne almozojn ! »

FR. IZIDORO,

Profesoro ĉe la Reĝa Blindulejo de Woluwe,
apud Bruselo.

UTILECO KAJ EBLECO DE LA ALPRENO DE LINGVO INTERNACIA EN MEDICINO

Tia estas la temo de la doktora tezo kiun S^{ro} P. Corret prezentis, antaŭ kelkaj semajnoj, ĉe la Pariza Fakultato de Medicino. Tiu grava verko estis laŭte aprokata de la juĝantaro kaj ricevis la mencion «tre bone». Ĝi distingiĝas per multaj interesaj punktoj, kaj ni pensas ke detala analizo de ĝia enhavo en tiu ĉi ĵurnalo ne estos senutila.

La aŭtoro skribinta al multaj ĉiulandaj profesoroj kaj kuracistoj, por demandi al ili «ĉu ili pensas ke estus utila kaj ebla la enkonduko de helpa internacia lingvo en medicinon?» konigas en sia antaŭparolo iliajn respondojn. La profesoroj Grasset (Montpellier), Lépine kaj Soulier (Lyon), Bergonié (Bordeaux), Bouchard, Achard, André Broca, Fournier, Ch. Richet, Gariel (Paris), ĉiuj eminentuloj, konfesis, unu post la alia, ke la diverseco de la lingvoj estas grava malhelpilo al la pritraktado de la sciencaj temoj, nome medicino, kaj la neceseco de internacia lingvo fariĝas pli urĝa. Ni ne povas citi tie ĉi detale ĉiujn respondojn ; jen estas tamen tiu de Profesoro Richet el Parizo :

1^o La ebleco de lingvo internacia ne estas utopio, ĉar eksperimento pruvas absolute ke oni povas paroli du naciajn lingvojn, flandran kaj francan, provencalan kaj francan, svedan kaj finnan, k. t. p.

2^o En la studoj medicinaj, multe da tempo estas perdata pro la neceseco lerni la lingvojn fremdajn. Oni dediĉas du jarojn al la germana lingvo, unu jaron al la angla kaj ilin oni nur malbone komprenas. Post ses monatoj oni scias bone paroli kaj skribi esperante.

3^o Se la lernadaj programoj enhavus la instruadon de Esperanto, post kelkaj jaroj, tiu lingvo estus alirebla de ĉiuj, kaj tio simpligus la studojn medicinajn.

Post tiu antaŭparolo, D^{ro} Corret, en la unua ĉapitro de sia verko, parolas pri la medicinaj internaciaj kongresoj. Tie ĉi precipe rimarkiĝas la malfacileco de la rilatoj inter scienculoj de la diversaj popoloj pro la multeco kaj nelernebleco de la lingvoj. D^{ro} Lucas-Championnière el Parizo, Prezidanto de la tria kongreso de la Internacia Societo de Hirurgio, ĵus okazinta en Bruselo (1908) diris :

«Estas certe ke la multeco de la lingvoj neniigas «parton de la rezultatoj de tiuj internaciaj kunvenoj» kaj li bedaŭras ke Esperanto ne estas oficiala lingvo de la kongresoj. D^{ro} Kabanow el Moskvo, Demosthen el Bucarest kaj aliaj esprimis similajn ideojn.

Sekvas longa listo da kongresoj nemedicinaj kie oni proponis Esperanton, pro la malhelpo kaŭzita de la diverseco de lingvoj. En kongreso de Fizioterapio (1905), D^{ro} Krikortz el Stockholm legis en Esperanto verkon originalan, kiu estas represita plene kun franca traduko, en la tezo pri kiu ni parolas.

En la dua ĉapitro, D^o Corret, montrinte ke la nesciado de la fremdaj lingvoj malhelpas la serĉadojn kaj la legadojn de la fremdaj medicinaj ĵurnaloj aŭ verkoj, sciigas ke ĉiutage plimultiĝas la artikoloj publikigitaj en Esperanto, ke jam ekzistas teĥnika revuo «La Voĉo de Kuracistoj», ke plie estas presitaj Anatomia Vortaro, Farmaciologia Vortaro, k. t. p.

Dum la kongreso de Dreseno estas fondita la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio (T. E. K. A.) kiu jam grupigas pli ol 700 kuracistojn el ĉiuj landoj kaj faciligas la rilatojn inter la tutmondaj kuracistoj, ĉu pri la sciencaj serĉadoj, ĉu pri la internaciaj enketoj, vojaĝoj k. t. p. Ni petegas niajn kunfratojn belgajn samideanajn ke ili aliĝu al tiu interesa societo, kies prezidanto estas Prof. D^o Dor el Lyon; la vicprezidantoj estas D^o Myès el Altona kaj Whitaker el Liverpool, la sekretario D^o Robin el Varsovio kaj la kasisto D^o Fromageot el Beaune (Francujo). Per kotizajo de kvin frankoj ili havos la utilojn de la societo kaj ricevos senpage, ĉiumonate, la ĵurnalon «Voĉo de Kuracistoj». (1)

Ree ni parolu pri la tezo de D^o Corret. En la tria ĉapitro la aŭtoro parolas pri la Ruĝa Kruco kaj la nelacigebla agado de Leŭtenanto Bayol.

En la kvara li pritraktas la ĝeneralan problemon de lingvo internacia. Li montras ke la alpreno de unu el la nune vivantaj lingvoj ne estas ebla pro la konkurenco pri la supereco kiu ekzistas inter la popoloj; neniam unu el la diversaj nacioj konsentos pri la elekto de la lingvo de alia nacio. La alpreno de antikva lingvo, ekzemple la latina, ankaŭ ne estas ebla, ĉar ĝi estas malfacila, malsimpla kaj ĝi ne taŭgas por la teĥnikaj vortaroj. D^o Corret konkludas: «Inter la projektoj proponitaj, Esperanto estas la sola neŭtrala idiomo kiu trudiĝas por la rolo de helpa lingvo internacia; ĝi posedas ĉiujn necesajn ecojn kaj taŭgas por ĉiuj praktikaj aplikoj.»

Tia estas ankaŭ nia konkludo. Dum la Dresena kongreso ni ĉeestis la unuan kunvenon de la kuracistoj-kongresanoj. La ĉeestantoj estis el Anglujo, Francujo, Germanujo, Ruslando, Polujo, Italujo. Estis mirinde konstati ke la diskutado en Esperanto estis tre facila por ĉiuj; io kio ne ekzistas, bedaŭrinde, ĉe la medicinaj internaciaj kongresoj.

D^o BRIQUET.
(Armentières)

(1) Petu specimenan numeron de tiu ĵurnalo al la Ĉefredaktoro D^o STEFAN MIKOLAJEKI, strato Smadeckich 6, en Lwow (Aŭstrujo).

Asonanca versaĵo

(el Luis de Góngora)

1561-1627.

Plej bela knabino
El mia vilag',
Hodiaŭ edzino
De nur unu tag',
Vidante marŝantan
Lin al batalad',
Al patrino diras
Larmante sen halt',
Ho lasu min plori
Ĉe bordo de l'mar'

Ĉar, panjo, vi dotis
Min en frua aĝ'
Per plezur' mallonga
Kaj longa penad',
Kaj vi min fordonis
Al edzo, for jam,
Havanta ŝlosilojn
De mia malkapt',
Ho lasu min plori
Ĉe bordo de l'mar'.

La dolĉokupado
Pri ama rigard'
Nun, okuloj miaj,
Fariĝu plorad';
Vi, do, ne pli taŭge
Vin okupus, ĉar
Foriris militon
Jen li, mia pac'.
Ho lasu min plori
Ĉe bordo de l'mar'.

Ne min detenigu,
Nek kulpigu ja,
Pri tio - justeco,
Pri ĉi tio - prav',
Se tre vi min amas,
Ne venu kun bat',
Estas pli malbona
Mort' en sitentad'
Ho lasu min plori
Ĉe bordo de l'mar'.

Kara panjo, kiu
Povus sen plorad'
Vidi miajn verdajn
Jarojn de junag'
Tute velkiĝantajn,
Kaj sen plendo ajn
Restus, ne havante
Koron por kompat' ?
Ho lasu min plori
Ĉe bordo de l'mar'.

Foriru la noktoj,
Ĉar foriris jam
Kiu maldormigis
Min per la rigard'.
For, noktoj, ne vidu
Solecon en ĉambr',
Dum en lit' malmankas
La duona part'.
Ho lasu min plori
Ĉe bordo de l'mar'.

El hispana lingvo tradukis
VICENTE INGLADA.
(Valencia).

AVENTURO DE RABELAIS

Devigata eliri el Romo, tre malbone vestita kaj ne posedante eĉ unu moneron, Rabelais elpensis ruzon por iri tre oportune kaj bone vestita al Parizo.

Alveninte en Lyon a hotelo li postulis izolitan ĉambron kaj knabeton sciantau legi kaj skribi; li faris multajn paketojn

per la cindro kiun li trovis en la kameno. Tuj kiam la bubo estis alportinta inkon kaj paperon, li skribigis al tiu ĉi sur diversaj biletoj la jenajn menciojn: « Veneno por la Reĝo », « Veneno por la Reĝino », « Veneno por lia Duka Moŝto d'Orleans » k. t. p. . . tiujn biletojn li poste fiksitis ĉe la paketoj kaj dris al la knabo:

« Amiko mia, ne diru ion al iu ajn pri tio kion mi igis al vi skribi, ĉar vi riskus mian vivon kaj vian ».

Oni komprenas ke la skribinto tuj raportis al sia patrino pri tio kion li ĉeestis, kaj la bona virino ne trankviliĝis autaŭ o. ŝi estis denuncinta al la polico la novan gaston alvenintan en ŝian hotelon.

Tuj post la sciigo la poliestro kuris al la hotelo kun siaj pafarkistoj. Li faris demandaron al Rabelais kiu sufiĉe embarase respondis por ke la poliestro opiniis ke lia devo estas kapti la vojaĝanton kaj lian pakajon. Bone gvardita, Rabelais estis do kondukata al Parizo. Post sia alveno en tu urbo, li konigis sin kaj petis paroli al la Reĝo, al kiu li sciigis la ruzon kiun li uzis por veni al Parizo bone nutrita kaj vestita je la kostoj de lia Reĝa Moŝto.

Ŝajnas ke la reĝo, anstataŭ malkontentigi, ege ridis pri la aventuro kaj ke la tuta kortegularo tre amuziĝis pri la de la vojaĝinto uzita ruzo.

Oni diras ke el tiu okazintaĵo devenas la esprimo « La kvaronhoro de Rabelais » (« le quart d'heure de Rabelais ») por montri la situacion de iu, kiu, devigata pagi kaj ne havanta monon, penas trovi rimedon por eltiri sin el tiu maloportuna afero.

Frans SCHOOFs.

ESPERANTO FACILA

Estimata Sinjoro Skaldo,

Mi legis viajn artikolojn en « Esperanto facila »; ili tre amuzis min.

Mi decidis *de* skribi mian unuan Esperantan leteron al vi, kiu ŝajnas *amigi* la novulojn kaj . . . eble ankaŭ la novulinojn. Mi skribos *mem* al vi *ĉiu semajno*, se vi permesos tion, sed mi faros erarojn *nature*, ĉar mi nur *havas* dek-ok jarojn, kaj mi ternas Esperanton de nur du monatoj.

Mi petas vin korekti miajn erarojn. Vi povos fari tion publike en nia revuo: *kiel tio*, mi ne bezonos konigi mian adreson kaj ĉiu novulo povos profiti *de* tio.

Mi dankas vin *antaŭen* kaj salutas vin *gentile*.

JOZINO MAJULINETO.

(Skaldo jam substrekis la erarojn!)

Kara Fraŭlino Majulineto!

Dankon pro via *gentila* letero!

Mi ĵus ricevis tiun ĉi, kiam mi estis serĉanta bonan *temon* por mia kolono pri « Esperanto facila ». Vi do helpis min neatendite 1) kaj mi tuj volas plenumi 2) vian deziron.

Via letero estas pruvo 3) ke, se vi ne estas Francino, vi almenaŭ pensas france. En Esperanto, ĉiu vorto havas difinitan sencon. En estonto 4), diru simple, sen la senvalora vorteto *de*: *Mi decidis skribi*.

Mi ŝajnas *amigi* la novulojn! Ho! ho! *amigi* estas la plej alta grado de *ami*. Se vi havas fianĉon, 5) Fraŭlino, vi pravas 6) *amigi* lin; *amegu* unu la alian ĝis la morto!

Mi *ŝatas* la novajn esperantistojn, mi *ŝategas* ilian nehaltantan 7) laboron.

. . . eble ankaŭ la novulinojn. *Amigi* la novulinojn? Atentu, Fraŭlino, mi estas edziĝita 8)!

— Mi skribos *mem*, t. e. (tio estas) mi mem kaj ne alia persono skribos; vi intencis esprimi pli forte la ripeton de la skribo. Tiam oni uzas *ĉe*. Ekz.: mia hundo marŝas, kuras, saltas, *ĉe* dancas.

— *Ĉiu semajno*. Tia tempa esprimo estas skribata:

ĉu, kiel vi uzis ĝin, sed kun prepozicio *en* aŭ *je*,

ĉu, sen prepozicio, en akuzativa formo: *ĉiun semajnon*,

ĉu, adverbo: *ĉu semajne*.

Mi konsilas al vi fari ekzerce similajn 9) esprimojn per: *horo*, *tago*, *monato*, *jaro*.

— Ni ĉiuj eraras *nature*, Fraŭlino, malofte *artefarite*. 10) En tia senso mi opinias ke *kompreneble* esprimas pli precize vian ideon.

— Kara Jozino, vi ne *havas* dek-ok jarojn! Per tio, mi ne volas diri ke vi estas pli maljuna. Ne, vi havas la junecon, tial ke vi *estas* dek-ok jara. Kaj vi estas ĉiam juna, se en via koro briladas la floro de l'Espero.

— *Kiel tio* . . . estas reo iom franco pensita. Skribu: *tiel aŭ tiamaniere*.

— Sama rimarko pri: *profiti de*. Neniel la Esperanta vorto *de* estas uzbla tio ĉi, ĉar ĝiaj diversaj signifoj estas aliaj. Ni diru: *profiti per*.

— Danki *antaŭen*. Kun tiu verbo oni uzas *antaŭe*, tiel kiel vi skribis: salutas *gentile*.

Antaŭen rilatas 11) al verboj kiuj esprimas movon.

Antaŭen! estas la devizo de ĉiu bona Esperantisto, do ankaŭ la via.

Vi kuraĝis skribi. Nu! malgraŭ kelkaj malgrandaj eraroj, via letero estas neniel malbona. Mi eĉ (vidu supren!) konstatis kun kontenteco ke vi jam bone uzis la akuzativon; kaj mi estas ĉerta ke via letero estas komprenebla de ĉiu fremdlanda samideano. Kaj jen ĵus la unua kaj plej grava kondiĉo

en Esperanto: *interkompreni!* Unu vorteto aŭ litero pli aŭ malpli, ne malhelpos 12) la loĝantojn 13) de nia vasta mondo *interkonatiĝi* 14) kaj fratiĝi.

Daŭrigu vian lernadon, kara Fraŭlino, klopodu pripensi simple kaj ĉiam logike, do Esperante, kaj vi sukcesos iĝi baldaŭ unu el niaj plej lertaj Esperantistinoj.

Kiom dolĉe la Zamenhofa lingvo devas soni el via buŝeto, o Fraŭlino Jozino Majulineto!

SKALDO.

HUMORAĴOJ

Patro kiel fianĉo de siaj filinoj

Gaja okazintaĵo rondiris autaŭ nelonge en München. Privatulo estas vidvo kaj havas du filinojn estantajn respektive dudek kaj dudek-du jaraj. Ili tamen ne povis anstataŭi al li edzinon, tial li ekpensis, „laŭ la ne plu malordinara vojo”, nome per gazeta anonco ricevi novan edzinon. Li tamen tre miris, trovante inter la multaj ricevitaĵoj proponoj ankaŭ la leterojn kaj fotografaĵojn de siaj du filinoj. Ĉi tio ŝajnis sufiĉe amuzi lin, ĉar pseŭdonime li daŭrigis per skribmaŝino la korespondadon, ĝis la ambaŭ enamiĝintaj fraŭlinoj fine postulis vidi sian novan fianĉon. La vidvo ankaŭ ebligis tion al ili, venigante ilin je la sama horo en difinitan lokon kaj kondiĉante blankan dianton kiel rekona signo. Lia ĝojo pri la ŝerco jam komencis, kiam liaj ambaŭ filinoj antaŭe alportigis en sian domon blankajn diantojn, el kiuj li fine petis unu por si, por kun ĝi ekiri al la rendevuo. La mirego de la ambaŭ filinoj estis granda, kiam ili sentis, havi hazarde rendevuon en la sama loko kun la sama rekona signo; sed ĝi ankoraŭ pligrandiĝis, kiam fine ankoraŭ la paĉjo aperis, kun la sama malbonsigna blanka dianto, kaj li subbrakinte kondukis ilin hejmen.

Trad. Risinger
(Eĥo Esperantista)

— 0 —

En la Antverpena Stacidomo

Sinjoro aĉetas ĵurnalon kaj prezentas por ĝin pagi moneron da kvin frankoj.

1) neatendite, onverwachts, à l'improviste, — 2] plenumi, vervullen, remplir, — 3] pruvo, bewijs, preuve, — 4] estonto, toekomst, avenir; — 5] fianĉon, verloofde, fiancé — 6] pravi, gelijk hebben, avoir raison, — 7] nehaltanta, onophoudelijk, constant. — 8] edziĝita, getrouwd, marié, — 9] similajn, gelijksoortige, semblables, — 10] artefarite, kunstmatig, artificielement — 11] rilatas, heeft betrekking, se rapporte, — 12] malhelpi, verhinderen, empêcher. — 13] loĝantoj, bewoners, habitants, — 14] interkonatiĝi, met elkaar kennis maken, faire connaissance entre eux.

La Vendisto. — Mi ne havas ŝanĝmonon, Sinjoro, vi pagos morgaŭ, pasante.

La Sinjoro. — Kaj se mi estus dispremigatavojveturante?

La Vendisto (pensante pri siaj kvin centimoj). — Ho, la perdo ne estus tre granda!

— 0 —

Sinonimoj

Snobs parolis pri la belecoj de Svisujo: la belaj urboj, la altaj montoj, la bluaj lagoj. Li precipe laŭdis la lagon de Ĝenevo kaj la lagon Leman'an.

— Sed ambaŭ estas sinonimaj, rimarkigis Bobs.

— Tion mi scias tre bone, respondis Snobs, sed unu estas multe pli sinonima ol la alia!

— 0 —

Ekzameno

Dum ekzameno en popola lernejo oni demandis knabon:

— Kiel longe Adamo kaj Evo loĝis en la paradizo?

— Ĝis maturiĝis la pomoj! — respondis la knabo.

(Spritulo)

PROBLEMOJ (tre facilaj)

4^e **Vortoj kreskantaj kaj malkreskantaj.** Vokalo — nomo de litero — kolekto — malhelpaĵo — ligna aŭ fera konstruero — malgrandigo de prezo — kontraŭstarigo — kreskaĵo por la fumamantoj — ekleziulo — frapo = montras la pasivan verban formon — nomo de litero — vokalo.

5^e **Vortoj kvadratoj.** Agi — dolĉan senton — radiko de cirklajo — kiu meritas.

6^e **Metagramo** per o — o — b — d — k — m — n — s — t — z formu 7 vortojn kvarliterajn, el kiuj nur la unua litero diferencas.

PLANTANO.

Oni sendu la solvojn al S^{ro} Fr. Schoofs, sekretario de la Redakcio, 49, Kleine Beerstraat, Antwerpen (49, rue de la P^{te} Ourse, Anvers.)

En la lasta numero de la 1^a jarkolekto ni publikigos la nomojn de la solvintoj. Oni povas respondi pseŭdonime.

Belaj premioj estos aljuĝataj.

BELGA KRONIKO (I)

Ĉar la apero de « Belga Esperantisto » estas plifruigita duonan monaton la nuna kroniko estas malpli ampleksa ol kutime.

ANTVERPENO. Centra Komitato. La esperantista ĥorkantistaro sub la lerta direkto de S^{ro} Ant. Gohr tre bone prosperas. De nun la ĉiusemajnaj ripetadoj okazas ĉiuvendrede je la 8 1/2^a vespere, en salono (1^a etaĝo) de la « Maison des Brasseurs » (Brouwershuis), 18, rue de la Commune (Gemeentestraat). Speciala enirejo en la strato Breydel.

BOOM. La kursoj donataj en la tiea grupo treege sukcesas dank' al la belacebla sindonemeco de la profesoro S^{ro} Fr. Schoofs. Ĉiuj grupanoj senescepte abonis nian ĵurnalon.

BRUSELO. Merkredon la 3^{an} de Februaro, S^{ro} Paul Blaise, venante el Londono ĉecstis la kunvenon de la grupo « Pioniro ». Li priparolis la mirindajn progresojn de la Zamenhofa lingvo en Anglujo kaj Usono. Lia parolado faris grandan impreson kaj la ĉeestantoj entuziasme aplaudis la bonvenintan gaston.

CHARLEROI. La estraro de la « Karloreĝa Grupo Esperantista » estas kunmetita jene :

Prezidanto : S^{ro} L. Delvaux,

Sekretario : S^{ro} F. Wagner,

Kasisto : S^{ro} P. Hermans,

Dua Sekretario : S^{ro} F. Philippens,

Bibliotekisto : S^{ro} R. Mayer,

Komitattanoj S^{roj} A. Counson kaj F. Strivet.

LIEĜO. Nova kurso estas fondita dum la monato de Decembro de S^{ro} Morabito, direktoro de la Instituto Paumen. Afiŝoj per la verda stelo ornemitaj kaj verde presitaj estis anoncintaj la malfermon de la kurso sed bedaŭrinde la terura tertremo en Italujo kontraŭstaris la projekton : la direktoro reiris al sia lando kaj lia entrepreno ne realiĝis.

MEĤLENO. Antaŭ nelonge S^{ro} Abato E. H. Lambo, registristo de la Malgranda Seminario parolis pri Esperanto en la Mehlena sekcio de la flandramanto societo « Davidsfonds ». La « Gazet van Mechelen » publikigas tre laŭdan artikolon pri la parolado de nia honorinda samideano.

MORESNETO NEUTRA (Amikejo). La Universala Esperantista Asocio kies sidejo estas en Genevo, dediĉas premion al la unua flugmaŝinisto kiu estos trafluginta plenan rondvojon da 30 kilometroj en tri diverslingvaj landoj t. e. Belgujo, Germanujo kaj Holando, foririnte de Neŭtra-Moresnet'o.

